# LIGILO

N-ro 6 - Januaro 1990

Eldonkvanto: 1500 ekzempleroj

Brazila Esperanto-Ligo Cx Postal 11-1105 CEP 70084 Brasília/DF Tel 061/226-1298

## KLARIGOJ (AŬ PRIPLORO) PRI MALFRUIĜO

Ĉar en Brazilo la laboro por la esperanta afero estas plenumata nur de volontuloj, krom ne mansvingi kun la ebleco aliri la ĉielon, oni jam devus esti alkutimiĝinta al la altaj kaj malaltaj tajdoj, kiuj jen antaŭenpuŝas, jen terenĵetas la fervoron de la esperantistoj. Tamen, kiam oni metas sur sin la respondecon administri tiajn homenergiojn, oni tre malfacile alkonformiĝas al la sinteno de la volontuloj, al kiuj oni alfidas la taskojn. Ni kontrolu:

a. BRAZILA ESPERANTISTO: Post regali la brazilan esperantistaron kun la bonega numero 290, de januaro/februaro aperita en majo 1989, kaj krei atendemon kaj pozitivan sintenon, la redaktoro komplete silentis, malgraŭ la insistaj laŭdoj. Pridemandite de la nova estraro de BEL pri lia disponebleco daŭrigi sian laboron, li jesis. Tamen, en oktobro la nova vicprezidanto de BEL, dum laborvizito al la esperantaj institucioj en la sudo de la lando, kunportis plian materialon por la jam malfruiĝinta numero 291 kaj estis surprizita de la formala rezigno de la respondeca redaktoro!! La posteno vakas ekde tiam, malgraŭ la klopodoj de la estraro trovi anstataŭanton el inter la kompetentaj esperantistoj. Krom manko de redaktoro, la financaj rimedoj de BEL ne permesas eldoni novan tiel belaspektan numeron.

b. LIGILO: Simila historio, variante nur la tempo-periodo, pli mallonga, danke al la sperto akirita kun Brazila Esperantisto.

c. ALIĜILO LIGO/UEA: Preta ekde oktobro kaj distribuita al la ĉirkaŭ 110 konataj esperanto-asocioj, al mendintoj kaj kun la ordinaraj korespondaĵoj, la estraro ne volis ĝin sendi, tiel seke al la kotiz-pagintaj esperantistoj, kiuj atendadas ricevi la informajn eldonaĵojn de Ligo, kiujn ili meritas kaj rajtas.

ĉ. LIBROLISTO/KATALOGO: Bonvolu legi koncernan rubrikon.

d. PERKORESPONDA KURSO: BEL-estraro sukcesis finfine, en oktobro 1989, elaĉeti la materialon. Tamen oni ankoraŭ ne povas anonci aperdaton (daŭras la problemo pri kompetenteco X sindono).

## E S T R A R O

Nova estraro elektiĝis por la oficperiodo 1989/1992 en Campo Grande / MS okaze de la 25-a Brazila Kongreso de Esperanto. Gravas komentarii ke, spite al insistaj alvokoj de la iama estraro al la brazila esperantistaro kandidatiĝi por la nomita periodo, ĝis laŭstatuta limdato neniu sin prezentis, eĉ ne la kritikemuloj kaj plurdekjaraj esperantistoj, verkistoj kaj paroladistoj. Sekve, unu semajno antaŭ tiu limdato, por ne permesi krizestiĝon, grupeto da esperantistoj kaj simpatiantoj, loĝantaj en la sidejurbo Braziljo, akceptis la defion.

Nur tri el la nun restantaj estraranoj regas Esperanton! Du el la sepkapa grupo jam rezignis pri iliaj postenoj (ĝuste la aliaj du kiuj ankaŭ iom scipovis la zamenhofan lingvon). Oni sukcesis allogi unu ne esperanto-parolantan anstataŭantinon kaj restas vaka ankoraŭ unu kasista posteno. La estraro faras la eblon, kun la netaksebla helpo de la iamaj estraranoj, kaj strebas iel lerni kaj kompetentiĝi pri brazila kaj monda esperanto-movado.

Jen finfine la nomoj kaj la postenoj de la nunaj estraranoj: Prezidanto: Deputito José Lins Albuquerque; Vicprezidanto: Josias Ferreira Barboza; Unua Sekretario: Enivaldo Alves Silva; Dua Sekretario: Márcina Saldanha Barboza; Tria Sekretario: Carlos Alberto de Deus; Unua Kasistino: Francisca de Fátima Almeida de Deus.

## PROKRASTITA LA 1-A SEMINARIO DE LA FEDERACIA KONSILANTARO

Planita por okazi la 10/12-an de januaro en urbo Três Rios/ RJ, du tagojn antaŭ la 1-a Renkontiĝo de Esperantistoj de Rio de Janeiro, estis bedaŭrinde prokrastita tiu gravega seminario, kiu kunvenigus la prezidantojn aŭ anstataŭantojn de la societoj respondecaj pri la kunordigado de la esperantista agado de la 26 ŝtatoj kaj Federacia Distrikto. BEL dufoje sendis kunvokan leteron pri la afero kaj kontaktis persone kelkajn konsilantojn. Kontrolante pertelefone du semajnojn antaŭ la evento, la organizanto de la seminario konstatis la konfirmon de nuraj kvar partoprenantoj!! La novan daton BEL proponis por la 4-5an de Julio, du tagojn antaŭ la 26-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Salvador, Bahia. En la nomita renkontiĝo la konsilantoj diskutos kaj decidos pri gravaj organizaj aspektoj kaj dokumentoj de la brazila esperanto-movado. Ni profitas la okazon por revoki la estrarojn de la ŝtataj Esperanto-asocioj.

## VAKAJ POSTENOJ KAJ SERVOJ

Ankoraŭ vakas, atendante pri eventualaj respondecaj kunlaborantoj, la jenaj postenoj kaj servoj de BEL: a) redaktoro de"Brazila Esperantisto"; b) redaktoro de "Ligilo"; c) direktoro de Departemento pri Informado; ĉ) direktoro de Departemento pri Instruado; d) Konstanta Kongresa Sekretario (KKS); e) kompilanto por kompleta dosiero pri esperanto-instruado en la brazilaj lernejoj, por instrumenti la brazilan esperanto-movadon por pledado por Esperanto ĉe la registaro.

## ĜISDATIGO DE LA ADRESARO DE BEL

BEL dependadas de la lokaj kaj ŝtataj asocioj al kiuj ĝi sendis kopion de la koncernaj partoj de la adresaro por ĝisdatigo. Tre malmultaj pozitive reagis ĝis nun al tiu ero de BEL administrado, malgraŭ klarigoj pri ĝia graveco publikigitaj en la antaŭaj numeroj de "Ligilo".

## ZAMENHOFA NASKIĜDATO MEMORFESTITA

La memorfestoj pri la Zamenhofa Tago, la 15-an de decembro, estas tradicie kromutiligita tutmonde kvazaŭ oportuna por emfazo je la disvastigo de Esperanto. Ĉi ĵus finiĝinta jare, Brazila Esperanto-Ligo kaj la Ambasado de Popola Respubliko de Pollando kunmemorfestis, en ties ambasadejo, per bela festo, kun ĉeesto de ĉirkaŭ 120 homoj, inter esperantistoj el Braziljo kaj Anapolo, amikoj de la ambasada oficistaro kaj la brazilja diplomatiaro. En la programo estis la parolado de Lia Moŝto la Ambasadoro, S-ro Stanislaw Pawliszewski (la ŝtataj societoj ricevos kopion) kaj de Profesoro Sylla Chaves, membro de la Akademio de Esperanto, prezento de la esperantista kantisto Flávio Fonseca, la filmo "Pollando Invitas" kaj koktelo.

La ĉi nomita memorfesto estas praktika programero de kontrakto pri kultura kunlaboro en preparfazo inter BRAZILA ESPERANTO-LIGO kaj POLA ESPERANTO-ASOCIO, kunperado de la diplomatiaj reprezentejoj en la koncernaj landoj.

Eblecoj ekestiĝas pri similaj kontraktoj kun aliaj landoj.

## "BRIKOJ" DE ESPERANTO CENTRO ZAMENHOF DISVENDATAJ

BEL peras la disvendon de limigita nombro de kuponoj/brikoj de Esperanto-Centro Ludoviko Zamenhof, en Bialistoko. Disvendata ĉiulande, la kuponoj celas la universaligon de la ŝanco partopreni en la efektivigo de tiu konstruaĵo/simbolo. Ofte okazas lotumado inter la aĉetintoj, kies premio estas senpaga restado en Bialistoko (bedaŭrinde ne inkluzivas la flugbileto). Pli valoras persona partopreno ol la mono, kiun fiksas la aĉetonto mem, ekde 5-10 USD. Interesatoj sendu ĉekon nome de BEL, nomante la celon.

**1990**

En la komenco de 1990, kiu estas la komenco de la lasta jardeko de la jarcento, ni deziras al ĉiuj entuziasman kaj sukcesoplenan laboron, por ke al la triamiljaruloj estu glataj la vojoj al nia FINA VENKO!

## O ESPERANTO NA 11ª BIENAL INTERNACIONAL DO LIVRO

A Bienal Internacional do Livro é atualmente considerada o maior evento cultural da América Latina e o quinto maior do mundo.

Nesse contexto, de 25 de agosto a 02 de setembro, em São Paulo/SP, o Esperanto estará pela primeira vez representado em estande próprio.

O objetivo principal dessa participação será divulgar o Esperanto através de sua literatura.

Para tornar isso possível, foi elaborado o projeto "O Esperanto na Bienal Internacional do Livro" e iniciada uma campanha para adquirir os fundos necessários. A primeira etapa do projeto consistiu em conseguir 3000 BTN's, para a inscrição da Liga e conseqüente pagamento de um estande de $15m^2$.

A primeira etapa foi bem sucedida e a segunda, que visou arrecadar outras 3000 BTN's para o preparo de material informativo diverso (especificado no projeto), também.

Porém, com o propósito de preparar uma quantidade maior de material informativo e de melhor qualidade e considerando que menos de cento e cinqüenta pessoas participaram da campanha, decidimos prosseguir com a mesma até março.

O valor da contribuição não foi fixada, já que cada pessoa tem diferentes possibilidades financeiras. Esperamos apenas que as doações sejam feitas com critério. levando em conta a importância e a amplitude do projeto.

A Bienal passada foi visitada por 804 mil pessoas, sendo esperado para esse ano um público ainda maior. Esse número nos permite calcular que haverá espaço para distribuição racional de até 200 mil informativos; mais um motivo, portanto, para prosseguirmos com a campanha.

Como o projeto não foi distribuido a todos os associados ou pessoas cadastradas junto à Liga, muitos estarão tomando conhecimento do mesmo neste momento. Os interessados poderão nos escrever pedindo cópia.

Solicitações de verbas foram encaminhadas a entidades não esperantistas mas já recebemos duas respostas negativas. Continuaremos trabalhando no sentido de conseguir apoio financeiro fora do movimento esperantista.

## ELEKTRONIKA SEKRETARIINO KAJ VIDBENDA APARATO

Ligo sukcesis post kontaktoj ĉe "Receita Federal", po unu el la supre menciitaj aparatoj, malgraŭ la longeco de nia listpeto. Novaj kontaktoj survojos post iom da tempo kaj eventualaj ŝanĝoj en la tiea administrantaro.

## SIDEJO KAJ SPACOMANKO

Tiuj kiuj vizitas(is) BEL-sidejon povas paroli pri la spaco-manko kaj (mal)ordo.Pro la kresko de la libroservo kaj de la biblioteka-kolekto, preskaŭ ne restas spaco por la deĵorantoj.

La estraro klopodas ĉe oficialaj vojoj atingi alian ĉambron por BEL.

## KALENDARO POR LA JARO 1990

Esperantlingva, verda kaj ruĝa sur blanka fono, poŝtkartformata kun ebleco uzi por sendi mesaĝojn. Kontraŭ nur 4 BTN's la deko!

## AL HAVANO PER RADIO!

La Esperanto-redakcio de Radio Havano anoncas konkurson, kies ĉefa premio konsistas el senpaga vojaĝo kaj restado en Havano dum la kongresaj tagoj. La konkurson kunaŭspicias UEA kaj la Kuba Ministerio pri Kulturo.

Simple verku respondon al la demando: Viaopinie, kiun gravecon havos por la Esperanto-komunumo okazigi la 75-an Universalan Kongreson en Kubo?

La respondo estu minimume dupaĝa aŭ 50-linia, maksimume kvinpaĝa, kaj klare verkita. Krom la plej bona, ankaŭ la ceteraj dek plej bonaj respondoj ricevos premion. Sendu por alveni antaŭ la 30-a de aprilo 1990, al Konkurso "75-a UK en Havano", Radio Havano, Poŝtfako 7026, Havano, Kubo.

KARAVANON AL LA 75-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - HAVANO - KUBO ARANĜAS BEL. Respondecas pri ĝia organizado la asocianino Maria Antônia Ladalardo el São Paulo kaj pri la vojaĝo, turisma entrepreno "Evasión". Informajn prospektojn disdoniĝos februare. Ni povas antaŭinformi kelkajn hotel-prezojn, por la periodo 14-21 Julio.

### INDIVIDUAJ PREZOJ

UNUARANGA HOTELO:
- Dulita ĉambro - US$ 420
- Unulita ĉambro - US$ 560

TURISMA HOTELO:
- Dulita ĉambro - US$ 304
- Unulita ĉambro - US$ 400

"L I B R O - S E R V O"

PESQUISA

Para ampliar a oferta de títulos, a partir de agosto de 1989 iniciamos uma pesquisa de mercado junto a todos os que se comunicaram com a Liga, seja por correspondência de rotina ou por telefone, objetivando saber quais os livros que os nossos clientes comprariam, se disponíveis em nosso "Libroservo". Esta pesquisa durou quase 4 meses e como resultado tivemos que importar cerca de 150 novos títulos, que já começaram a chegar e estão sendo remetidos para os que se comprometeram a comprá-los. Com isto o "Libroservo" já dispõe de cerca de 650 títulos. E vamos continuar com a pesquisa, pois nossa meta é atingir 1000 títulos até o final do ano. Já estamos numa fase que nos permite encomendar grande parte dos títulos novos anunciados nos principais periódicos esperantistas. Com esta política dentro de pouco tempo teremos quase todos os títulos disponíveis em Esperanto.

KATALOGO

No princípio de 1989 fizemos um Catálogo com cerca de 500 títulos. Já com o orçamento das gráficas nas mãos, tivemos que sustar a impressão, tendo em vista a escalada dos preços. Preferimos aguardar um pouco e posteriormente fizemos outro catálogo, com os preços em moeda estrangeira, tentando resolver parte do problema. Entretanto, com a inflação no patamar em que se encontra, e com a política de preços da Liga (câmbio oficial na data do faturamento), não temos como incentivar as vendas, pois a pequena margem de descontos que obtemos das editoras não nos permite efetuar vendas para recebimento com 10 ou 15 dias após o faturamento. Ficaríamos sem capacidade financeira para reposição do estoque tão duramente conseguido nos últimos 3 anos e meio. Assim, estamos atendendo apenas os pedidos referentes à pesquisa e dos esperantistas que têm pago com pontualidade os seus compromissos junto ao "Libroservo", sem no entanto emitir catálogo ou lista de preços.

LANÇAMENTOS

Em 1989 foram lançados "SPIRITAJ MESAĜOJ" (Pietro Ubaldi) - NCz$ 60,00;"GRANDE DICIONÁRIO ESPERANTO/PORTUGUÊS" (I.G.Braga - 2ª Edição - Suplemento de S. Chaves) - NCz$ 360,00; "VOCABULÁRIO PORTUGUÊS/ESPERANTO/PORTUGUÊS" (C.Domingues - Suplemento de S. Chaves) - NCz$ 292,00; Este ano saiu "LA LIBRO DE LA SPIRITOJ"(FEB) NCz$ 166,00.Todos disponíveis na Liga. Preços válidos até 28.02.90. Descontos para revendedores. Os preços estão sujeitos a pequenas alterações, de acordo com as editoras.

ZAMENHOF EDITORES

A partir de dezembro de 1989 a Liga tornou-se o distribuidor exclusivo das edições da "Zamenhof Editores", inclusive para o exterior. Além de "ESSÊNCIA E FUTURO DA IDÉIA DE UMA LÍNGUA INTERNACIONAL", editado em janeiro de 1988, a editora lançou recentemente "MI VIZITIS GRANDAN URBON", de Gbeglo Kofi (NCz$ 80,00 até 28.02 90). Descontos para revendedores. Os preços estão sujeitos a pequenas alterações, de acordo com a editora.

KONGRESOJ

26-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO - Kulturo kaj Disvolviĝo estas la ĉeftemo de la 26-a Brazila Kongreso de Esperanto, la 6-10an de julio 1990, en Salvador/BA, kies preparlaboroj bone marŝas. Informojn petu rekte al la LKK (Caixa Postal 2550 - CEP 40021 - Salvador/BA).

27-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO - Ankoraŭ ne estas kandidata esperanto-asocio por gastigi la 27-a BKE. BEL atendas proponojn.

XI BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA KONGRESO - De la 5-a ĝis la 9-a de februaro 1990 Urbo Campina Grande/PB. Organizata de Brazila Esperantista Junulara Organizo(BEJO) kaj Esperanto-Asocio de Campina Grande/PB (Caixa Postal 277 - Campina Grande/PB - CEP 58100) prezentos kiel kongresa temo: "VOJAĜADO KAJ LERNARDO". Petu aliĝ-bultenon!

## ASSINATURAS DE REVISTAS E JORNAIS

Para assinar qualquer das revistas oferecidas pela Liga, envie o formulário abaixo preenchido (ou anote em outro papel), juntamente com um cheque nominal, cruzado, no valor da(s) assinatura(s), para:

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO / Caixa Postal 11-1105, CEP 70084 - Brasília/DF

Atenção: Se você ainda não se associou à Liga Brasileira de Esperanto ou não quitou sua adesão para o ano de 1989, favor acrescentar 10% no total de seu pedido para fins de cobrir despesas de remessa para o exterior. Boletins de Adesão no endereço acima.

FORMULÁRIO PARA PEDIDO DE ASSINATURA — Data: / /90

Nome: ____________________

Endereço: ____________________

CEP ______ Cidade ______ Estado ______ Tel.: ______

| TÍTULO | BTN | NCz$ |
|---|---|---|
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| Sub-total | | |
| Acréstimo de 10% (Os associados da LIGA, quites 1989, estão isentos desta taxa) | | |
| TOTAL | | |

PROMOÇÃO ESPECIAL SÓ PARA ASSOCIÇÕES

## 11ª ADESÃO A SALVADOR GRATUITA!

As associações esperantistas que organizarem caravanas para o 26º Congresso Brasileiro de Esperanto, em SALVADOR/BA, gozarão do direito de uma adesão gratuita para cada 10 (dez) participantes.

Com a presente promoção a LIGA pretende incentivar maior participação no mais importante evento esperantista anual do BRASIL.

Contatos para detalhes, diretamente com a Comissão Organizadora, através de seu presidente, RONILSON MENEZES MOTTA, telefone: (071) 832-1401 e (071) 237-3931.

# Brazila Esperanto - Ligo

Caro esperantista,
Agradecemos a gentileza da divulgação do presente, por meio de cópia ou de informação a outro esperantista.

## LIBROSERVO

Objetivando aumentar o número de títulos disponíveis em nosso Libroservo, a Liga está preparando uma pesquisa, a nível nacional, sobre os LIVROS EDITADOS NO EXTERIOR, AINDA NÃO OFERECIDOS EM NOSSOS CATÁLOGOS, QUE PODERIAM SER OBJETO DE FUTURAS AQUISIÇÕES POR PARTE DOS ESPERANTISTAS BRASILEIROS.

Tal pesquisa permitir-nos-á adquirir no exterior, de modo bastante racional, livros que potencialmente interessam aos nossos clientes, sem comprometer o nosso pequeno capital de giro.

À guisa de teste, estamos desde já fazendo esta pesquisa junto aos esperantistas que se comunicam conosco através de correspondências ou telefonemas.

Assim, agradeceríamos se você nos enviasse o questionário abaixo devidamente preenchido, bem como sugestões para a melhoria de nosso atendimento.

***

NOME: ______________________________

ENDEREÇO: ______________________________

CEP: ________ - CIDADE: ______________ - UF: ____ - TEL.: ________

Livros que poderiam constituir meu interesse em adquirir através da Liga:

TÍTULOS (mencionar na ordem cronológica de preferência)

______________________________

______________________________

______________________________

______________________________

______________________________

______________________________

______________________________

______________________________

______________________________

______________________________

______________________________

Caso tenha mencionado mais de um título:

- -Gostaria de receber todos de uma vez, logo que disponíveis na Liga ( )
- -Gostaria de receber um livro cada mês, na ordem de preferência ( )
- -Prefiro decidir futuramente, quando os mencionados livros estiverem disponíveis na Liga ( )
- -Para sugestões, usar o verso deste

ESTE QUESTIONÁRIO NÃO IMPLICA A OBRIGATORIEDADE DA AQUISIÇÃO DOS LIVROS

SCS - Ed. Jockey Club - sala 103 Telefono (061) 226-1298
70300 - Brasília - DF - BRAZILO
Caixa Postal 11-1105 - CEP 70084 - Brasília - DF BRAZILO

## PLIGRANDIGO DE LA OFERTOJ DE ABONPERIODAĴOJ

La nombro de periodaĵoj perataj de BEL kreskis de 24 ĝis 28, nome:

| VICORDO | | TITOLO KAJ KELKAJ KARAKTERIJOJ | PREZO EN BTN |
|---|---|---|---|
| 01 | - | BULGARA ESPERANTISTO - Monata | 24.00 |
| 02 | - | DIA REGNO - Monata | 16.00 |
| 03 | - | EKUMENISMO - Trimonata | 16.00 |
| 04 | - | EL POPOLA ĈINIO - Monata - 1 jaro | 12.00 |
| | | - 2 jaroj | 19.00 |
| | | - 3 jaroj | 27.00 |
| 05 | - | ESPERANTO - Monata | 20.00 |
| 06 | - | FOKUSO - Trimonata - 6 numeroj | 37.00 |
| 07 | - | HEROLDO DE ESPERANTO - 16 numeroj | 28.50 |
| 08 | - | ILTIS-FORUMO - Aperas tri-foje jare - 1 jaro | 16.29 |
| | | - 2 jaroj | 32.57 |
| | | - 3 jaroj | 48.86 |
| 09 | - | INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO - Tri numeroj jare | 11.00 |
| 10 | - | INTERNACIISTO - Dumonata | 13.00 |
| 11 | - | JUNA AMIKO - Dumonata - 1 jarabono | 7.00 |
| | | - 3 jarabonoj (ĉiu) | 6.00 |
| | | - 7 jarabonoj (ĉiu) | 5.00 |
| | | - 28 jarabonoj aŭ pli ol (ĉiu) | 4.50 |
| | | **Rim.: La grupabonoj estos senditaj al sola adreso)** | |
| 12 | - | KONTAKTO - Sesfoje jare | 10.00 |
| 13 | - | LA ESPERO EL KOREIO - Dumonata | 11.25 |
| 14 | - | LA GAZETO - Ses numeroj | 37.00 |
| 15 | - | LA JARO - Poŝa kalendaro de la revuo MONATO | 9.36 |
| 16 | - | LA KANCERKLINIKO - 5 numeroj | 22.10 |
| 17 | - | LAŬTE - Dumonata | 7.71 |
| 18 | - | MEDICINA INTERNACIA REVUO - Sesmonata | 23.21 |
| | | (Inkluzivas abono de MEDICINA KURIERO por 1 jaro) | |
| 19 | - | MEDICINA KURIERO - Abono por tri jaroj | 11.60 |
| 20 | - | MONATO - Monata | 41.58 |
| 21 | - | OOMOTO - Sesmonata | 6.80 |
| 22 | - | PACO - Dumonata | 15.50 |
| 23 | - | SCIENCA REVUO - Sesmonata | 19.94 |
| 24 | - | | |
| 25 | - | SIMPOZIO - Sesmonata | 4.73 |
| 26 | - | SURVOJE | 27.90 |
| 27 | - | TUTMONDAJ SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ - Trimonata | |
| | | **Aer-poŝte** - 1 jaro | 22.50 |
| | | - 2 jaroj | 42.17 |
| | | - 3 jaroj | 64.66 |
| | | **Mar-poŝte** - 1 jaro | 11.25 |
| | | - 2 jaroj | 19.68 |
| | | - 3 jaroj | 30.92 |
| 28 | - | VOĈO DE HANDIKAPULOJ - 5 numeroj | 7.90 |

**ATENÇÃO!** Temos em estoque o livro SALUTON! ESPERANTO AŬTODIDAKTE, de Audrey Childs--Mee, editado pela UEA, ilustrado, 234 páginas. Já na 5ª edição, é o livro mais vendido atualmente na Europa, para curso básico. Concedemos desconto de 20% para compras a partir de 6 exemplares, pagamento 5 dias após o faturamento. Preço em florim: 26,40, mais 5% sobre o líquido da fatura, para despesas de remessa. Temos também fita cassete relativa ao curso (respostas dos exercícios propostos). Preço: 13,20 florins. Mesmas condições.

## LA 25-JARA JUBILEO DE LA RADIOPROGRAMO "KLUBO DE ESPERANTO"

La 21-an de majo 1990, la radioprogramo "KLUBO DE ESPERANTO", de "Rádio Clube Sorocaba", fariĝos 25-jaraĝa.

Sorokaba Esperanto-Klubo invitis sian membraron kunsidi la 21-an de januaro por, interalie, pridiskuti plenumotajn fest-eventojn. Rezultojn de la kunsido ankoraŭ ne atingis BEL-n.

## SERVIÇO DE ASSINATURAS

Solicitamos aos assinantes de revistas editadas no exterior (assinadas através da Liga), que eventualmente não tenham recebido suas revistas, que nos escrevam informando o título da mesma, data da assinatura ou número do recibo. Estamos fazendo um controle de qualidade do serviço de assinaturas para melhorar o atendimento aos associados e não anunciar revistas de editoras que não estão efetivando as solicitações de assinaturas.

## ESPERANTO ĈE FAKULTATOJ EN BRASÍLIA

* Ĉe "Centro de Ensino Unificado de Brasília (CEUB)", en la kurso pri Komunikado, ĉirkaŭ 60 studentoj ĉeestis 30-minutan prelegon de la Vicprezidanto de UEA, S-ro Roman Dobrzynski. Lia vizito al la kurso estis propono de BEL al la studentoj kiuj devis plenumi taskon pri Esperanto kaj, serĉe al informoj vizitis BEL-n.

Rezultoj de tiu kontakto aperis sub la formo de noticoj en radioprogramo kaj intervjuo kun Néia Lúcia en naciskale dissendita TV programo (TV BANDEIRANTES).

* Ĉe "União Pioneira de Integração Social (UPIS)", en kurso pri Konto-scienco, kies profesorino klopodas ke la studentoj informiĝu pri ĉio ekzistanta, sekve, ankaŭ pri Esperanto, okazis 15-minuta informado kun respondoj al demandoj. Ĉefa rezulto estis la kontakto kun la profesorino kiu ricevis pliajn informojn transdonotaj al aliaj studentoj.

## BIBLIOTEKO

Ni petas de la artikolistoj de esperantujo bv. sendi urĝe al BEL, kopion aŭ originalon de la artikoloj pri Esperanto publikigitaj en 1989. La kolekto de ĵurnal-eltranĉaĵoj rilate al 1989 estas en preparo por bindigo. Ni zorgu pri nia historio, karaj!

## HELPON, ni petas!

Biblioteko Carlos Domingues, de BEL, havas preskaŭ kompletan kolekton de revuo ESPERANTO (UEA). Mankas al ni kelkaj numeroj el la jaroj: 1907, 1909, 1921, 1923 kaj 1924. La kolektemuloj kiuj havas tiujn raraĵojn, bonvolu kontakti nin. Ni povas interŝanĝi kontraŭ aliaj numeroj. Lastkaze ni akceptos kopiojn de la mankantaj numeroj. Elspezojn pagos BEL.

## INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO (IKU)

En la kadro de la 75-a UK okazos la 43-a sesio de IKU. Universitaj profesoroj kaj simile kvalifikitaj personoj povas proponi prelegon al la Komisiono pri IKU ĉe la sekretario: Prof-o Bruce Sherwood, Dept. of Physics, Carnegie Melon University, Pittsburgh PA 15213, Usono. Estus bonvene se la prelegoj traktus iun el la aspektoj de la kongresa temo. Oni sendu pasportformatan foton kaj kvar kopiojn de la titolo, resumo, bibliografio kaj biografieto antaŭ 15-a de januaro 1990. Prelegantoj ricevos danksumon sed ne repagon de vojaĝkostoj. Estas necese ke la prelegantoj estu aliĝintaj al la kongreso. Oni aparte invitas proponojn de junaj universitataj instruistoj kaj profesoroj kaj de tiuj kiuj ankoraŭ ne prelegis en IKU.

IMPRESSO

Remetente: LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
Caixa Postal 11-1105
CEP 70084 - Brasília - DF